

POLA ESPERANTISTO

JARO XXIII. APRIL O 1929. * NR. 4.



ROK XXIII. KWIECIEŃ 1929. * NR. 4.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—. duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

1 strona	Zł. 60.—
1/3 strony	" 32.—
1/4 strony	" 17.—
1/8 strony	" 10.—

ANONCOJ:

1 paĝo	Zł. 60.—
1/3 paĝo	" 32.—
1/4 paĝo	" 17.—
1/8 paĝo	" 10.—

TREŜĈ — ENHAVO:

SŁAW: MASZYNA CZY CZŁOWIEK?! SOB. (POZNAŃ): POL-LANDA EKSPozICIO EN POZNAŃ. JAN KOSTECKI: LA SEN-HEREDIGITO DE HELSINKI. JAN KASPROWICZ: MI MALA-MAS... BR. KUHL: FORGEJO. ADAM GRZYMAŁA SIEDLECKI: VERA HISTORIO DE DON JUAN. FELIKSO ZAMENHOF: MIAJ REMEMOROJ, — DEKLARACJA W SPRAWIE NEUTRALNO-ŚCI. — POLLANDA KRONIKO. — KRONIKA ZAGRANICZNA. — KOMUNIKOJ DE P. E. D. — BULTENO DE U. E. A. — TRADUKA KONKURSO.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO.

KRAKÓW
KWIECIEŃ 1929 APRILO

Nr. 4 N-o

MASZYNA CZY CZŁOWIEK ?!

„A więc jednak esperanto praktycznie może się na coś przydać i oddać ogromne usługi” — powiedział mi onegdaj mój przyjaciel-ekonomista, dotychczas zawzięty wróg esperanta (nawiasem mówiąc esperanta nie znał, nigdy go nie słyszał, a wiedział tylko, iż „coś takiego” istnieje...). A przekonał go do esperanta ostatni Międzynarodowy Zjazd w sprawie turystyki i reklamy, odbyty niedawno (30-go marca do 2 kwietnia br.) we Frankfurcie n/M., na którym z racji swego zawodu uczestniczył.

„Zamiast niewyraźnego bełkotania czy charczenia słychać było mowy wyraźne i — jak widziałem — dla wszystkich uczestników zrozumiałe. Nie tracono czasu na tłumaczenia każdej mowy na kilka oficjalnych języków obrad. Mówiono albo wprost po esperancku albo we własnym języku, a przemówienia tłumaczono wyłącznie na esperanto. Oprócz ogromnego zysku na oszczędzeniu czasu miało to i tę dobrą stronę, iż zjazdowcy w swym ojczystym języku wysławiali się dokładniej i z większą łatwością, niżby to czynili w którymś z oficjalnych języków zjazdu, jak to ma miejsce na innych kongresach. Zamiast językowców, o turystyce czy reklamie nie mogących niczego miarodajnego powiedzieć, przemawiali istotni fachowcy nie krępowani trudnościami językowymi...” — mówił dalej mój rozentuzjzmowany dla esperanta rozmówca.

I miał słusność! Przyzna mu to każdy esperantysta, który miał sposobność porównać zjazd jakiś międzynarodowy esperancki z jakimkolwiek innym. A dla — jeszcze — nieesperantysty niech będzie świadectwem niesłuchanych trudności językowych na zjazdach międzynarodowych opinia „Pracy i Opieki Społecznej”, oficjalnego organu Ministerstwa Pracy i Opieki Społecznej w Warszawie (R. VIII, Nr. 3, str. 287 i in.):

„Przepis Traktatu, nakazujący tłumaczenie przemówień, ogłoszonych na Konferencji Pracy w jednym z języków oficjalnych (t. j. francuski i angielski), na drugi, powoduje stale nieproduktywną stratę czasu, tem bardziej, że przemówienia w innych językach są również tłumaczone na oba języki oficjalne. To też kwestja technicznych udogodnień w zakresie tłumaczenia była stałą troską M. B. P. (t. j.

Międzynar. Biura Pracy), które w roku obecnym wprowadziło częściowe przekazanie w drodze telefonicznej tłumaczeń na podstawie wynalazku Amerykanina Filene'a i przy jego finansowej pomocy. System Filene'a został dwójako zużytkowany. W czasie przekładu na drugi język oficjalny, wygłaszanego przez tłumacza, z trybuny mówców następowała drogą telefoniczną transmisja przekładów na kilka innych języków nieoficjalnych. Przy pulpicie każdego z delegatów znajdowała się specjalna instalacja telefoniczna wraz ze słuchawkami i przez kręcenie odpowiedniego kontaktu włączano tłumaczenie na żądany język. System ten pozwalał na śledzenie debat delegatom, nie posiadającym znajomości francuskiego lub angielskiego. W innych wypadkach tłumaczenie było telefonicznie transmitowane zarówno w drugim języku oficjalnym, jak w trzech nieoficjalnych (niemiecki, włoski i hiszpański) — równocześnie z przemówieniem danego mówcy przez tłumaczy, zasiadających na sali plenarnej i posiłkujących się przy swej pracy nadzwyczajną czułości mikrofonami. Metoda ta, wypróbowana podczas dyskusji, skróciła według obliczeń Biura czas dyskusji z 7 dni do 5. Tłumaczenie telefoniczne wywołało efekt polityczny. Delegaci robotniczy zgłosili rezolucję w sprawie oficjalnego wprowadzenia do prac M. B. P. języka niemieckiego. Kwestja języka niemieckiego w instytucjach Ligi Narodów, posiadająca już swą długą historję, mogła wywołać i tym razem zasadniczą dyskusję, czego zapowiedzią były poprawki, zgłoszone przez delegatów włoskich i hiszpańskich, domagających się identycznego uprzywilejowania języków włoskiego i hiszpańskiego".

W wywodzie powyższym uderzają nas dwie sprawy: po pierwsze tak skomplikowany system „zmaszynizowanego" tłumacza w formie telefonów, mikrofonów itd. skracał czas obrad zaledwie o 28% (zamiast 7 dni obrad 5 dni). Po drugie wyłoniła się odrazu kwestja języków narodowych. Dlaczego tylko francuski i angielski a nie niemiecki, włoski czy hiszpański? Jeżeli więc przyjmie M. B. P. i te języki, to wówczas przy pięciu oficjalnych językach nawet przy „maszynowem" rozwiązaniu kwestji językowej obrady nie tylko się skrócą, lecz przeciwnie przedłużą bardzo znacznie! A któż zabroni za miesiąc wnieść projekt uznania za oficjalny język obrad języka polskiego, czeskiego, japońskiego itd.?? Czyż to nie circulus vitiosus?!

Nie tędy więc droga, panowie! Żadna maszyna nie zastąpi w tłumaczeniu pracy człowieka! Jedyne wyjście ze sytuacji jest przyjęcie pomocniczego języka esperanto, neutralnego, nienaruszającego niczych uczuć narodowych. Esperanto zdało już egzamin zdolności kongresowej przedewszystkiem na 20 już międzynarod. zjazdach czysto esperanckich oraz 7 zjazdów międzynarod. fachowych, w których esperanto było także lub wyłącznie językiem obrad i tłumaczeń. Ostatnie te zjazdy odbyły się:

Przedmiot obrad:	Miejsce zjazdu:	Rok:
nauczanie	Genewa	1921
handel	Wenecja	1922
radjo	Genewa	1924

handel	Paryż	1925
wychowanie pokojowe	Praga	1927
religia	Haga	1928
turystyka	Frankfurt	1929

Ōsmą wreszcie próbą zastosowania esperanta do obrad na zjazdach międzynar. będzie Światowy Kongres Wychowawców, który rozpocznie się 25 lipca br. w Genewie, a na który zgłoszonych jest 3.000 (dosłownie trzy tysiące!!!) delegatów. Kongres ten jako język obrad w sekcjach i na penum będzie miał także esperanto.

Prób więc i to prób pomyślnych w najrozmaitszych dziedzinach życia nie brak. I zaprawdę niedalekim już jest czas, gdy esperanto zapanuje jako jedyny i wyłączny język tłumaczeń, a może i obrad, stając się czynnikiem harmonji między narodami i wiecznego pokoju.

Ślaw.

POLLANDA EKSPOZICIO EN POZNAŃ.

Polujo aranĝas de la 16. majo ĝis la 30. septembro 1929 en Poznań la unuan en sia historio tutlandan ekspozicion.

Tiu ekspozicio estos okazantaĵo aranĝita laŭ eŭropa skalo, kaj tion plej bone pruvas la fakto, ke kiam la brita ekspozicio en 1924—1925 en Wembley kune kun la dominion'oj okupis la spacon de 800.000 m², Polujo okupos 600.000 m², do tiu ekspozicio estos la unua kaj plej granda tiaspeca ekspozicio sur la kontinento.

Ĝi montros la tuton de pola kreemo speciale akcentante la akirojn de la unuaj dek jaroj de sendependa Polujo, nome la kulturon kaj arton, industrion, komercon kaj agrikulturon, fizikan edukadon kaj sportojn. Sur la ekspozicio prezentita estos ankaŭ la disvolviĝo de ŝtata administrado kaj la sistemo de ĝia organizo.

Honoran protekton de l' ekspozicio akceptis la Prezidanto de l' Respubliko. Al la Honora Komitato apartenas la membroj de la Registaro kun Marŝalo Piłsudski, reprezentantoj de Leĝdonaj Ĉambroj kaj polaj kardinaloj. Krom tio kreita estis Granda Komitato, al kiu apartenas 400 personoj reprezentantaj la plej superajn sferojn de kultura kaj ekonomia vivo de Polujo. Ĉefdirektoro de l' Ekspozicio estas eksa Ŝtata subsekretario D-ro St. Wachowiak.

La ekspozicio estis dividita je 32 grupoj kaj tiuj je 200 fakoj.

En aparta pavilono ekspozicios Poloj loĝantaj konstante eksterlande (antaŭ ĉio en Ameriko), kiuj prezentos la rezultatojn de la laboro de 6.000.000 elmigrintoj.

Tiu ekspozicio montros al la mondo, ke en la daŭro de la unuaj dek jaroj post la rericivo de la ŝtata sendependeco Polujo plenumis gigantan verkon kaj ne malbonuzis la konfidon de tiuj ŝtatoj, kiuj helpis al ĝia renaskiĝo. La lando detruita per la milito kaj rabajoj estis en tiu tempo denove rekonstruita, la tri disŝiritaj partoj ree kunkreskis, laborejoj estis denove movigitaj, la granda ŝtata aparato muntita, landa defendo starigita sur la eŭropa alteco, la lernejoj disvolviĝis, la valuto stabiligis. La ekspozicio devos atesti, ke Polujo estas matura kaj en la aro de nacioj fariĝis jam faktoro krea, utila kaj necesa.

Krom tio la ekspozicio devas montri al la pola socio klaran bildon de tiuj fakoj, en kiuj ĝi povas produkti memstare kaj sufiĉe pro la lando, en kiuj ĝi povas jam pensi pri eksporto, kaj al la fremda industrio malfermos grandajn perspektivojn por orientiĝi, en kiaj limoj ĝi povos liveri al Polujo necesajn produktilojn, maŝinojn kaj krudmaterialojn. Ĉar la ekonomiaj kaj politikaj rilatoj stabiligaŝ ĉiam pli, ekzistas nenia risko por tiuj investaĵoj.

Por la eksterlandaj turistoj malfermiĝas ideala okazo viziti Polujon kaj ekkoni la nacion, ĝiajn kulturojn, morojn kaj rimarkindaĵojn. Jam la ekspozicio mem liveros al la vizitantoj miloblajn emociojn. Tie sendepende de ekspozitaĵoj de laboro agrikultura kaj industria, sendepende de bildoj pri kulturo kaj arto okazos tutslavaj kongresoj. Antaŭanonciataj estas por tiu sezono ĉirkaŭ 200 kongresoj. Okazos ekstreme interesaj internaciaj vetludoj de liberaj balonoj, internaciaj vetludoj de „polo“, en kiuj partoprenos Amerikanoj, Angloj, Francoj, Hungaroj, Poloj, piedpilkaj meĉoj, internaciaj hipikaj konkursoj, interŝtata triobla meĉo de naĝantoj, internaciaj vetkuroj aŭtomobilaj, luktoj atletaj, boksistaj ktp.

La oficejo de Cook kondukos la turistojn per la plej mallonga, interesplena kaj plej cektrafa vojo tiel, ke ĉiu eksterlandano ricevos rapide necesajn kaj plej bonajn informojn pri Polujo.

La vojaĝo al la nunjara ekspozicio en Poznań kunigos do utilon kun agrablo. Komprenis tion la turistoj kaj, kiel montras la ĝisnunaj anoncoj, preparas sin al la veturo al Polujo centmiloj da personoj. La Pola registaro por plifaciligi eldonis specialajn instrukciojn limigantajn la normalan limrevizion, liberigis la veturantojn al la ekspozicio de la pasportaj depaĝoj kaj speciale por la amerikaj civitanoj ordonis liveri multoblaj enrivizojn por 4 dolaroj kun jara valoro.

Kiel ni montris, la ekspozicio en Poznań estos arangaĵo granda, celplena kaj bone organizita kaj tial, kiel tion montras la voĉoj de tutmonda gazetaro, fariĝos unu el la plej grandaj okazantaĵoj nunjaraj sur la kontinento. Viziti ĝin devos do ĉiuj interesiĝantoj pri progreso de kulturo kaj disvolviĝo de nacioj. **Sob. (Poznań).**

LA SENHEREDIGITO DE HELSINKI.

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj Esperantistaj Tiu lasta nomo tiom malagrabla al la orelo, tiom barbara, ke oni neniam uzas ĝin. Oni kontentiĝas diri „K. R.“ Kaj tiu K. R. estas efektive **koro** de nia movado, parlamento de ĉiuj societoj naciaj. Sendefenda koro, mizera parlamento.

K. R. elektas sian estraron, I. C. K.; K. R. alprenas decidojn. Sed por ĉiuj pli gravaj agoj de ĝia vivo necesa estas „interkonsento kun U. E. A.“. Eufemismo! Ĉar nek K. R., nek I. C. K. havas la rajton enmiksiĝi en la aferojn de Sinjoro U. E. A. Estas nur Sinjoro U. E. A., kiu rajtas ĉiam diri: „ne!“ kiam temas pri la aferoj de K. R. kaj de I. C. K. Ne interkonsento sekve, sed simpla permeso. Ne amikoj kunlaborantaj, sed estro kaj subuloj.

Kiamaniere okazis tio? Plej stranga historio! En norda Helsinki, malproksime de ĉiu centro de la Esperantista vivo, oni faris „kontrakton“. Kiu? — Sinjoro U. E. A. kun Sinjoro Chavet, sekretario(?) de la pratempa „Esperantista Centra Oficejo“ en Paris. Ĉar tiu „oficejo“ delonge ne funkciis brile, S-o Chavet opiniis do, ke li rajtas en ĝia nomo entrepreni decidojn, devigajn por la tuta Esperantistaro. Manko de logiko? Se vi volas. Sed tio ne malhelpis, ke S-o U. E. A. kaj S-o Chavet aperis antaŭ la kongreso kaj solene komunikis al ĝi la bonaŭguran „kontrakton“. Tusiĉe de tiom da amikeco inter niaj eminentuloj, la kongreso aplaudis. Oni klarigis al ĝi senprokraste, ke ĉar nun la Esperanta Movado estas jam organizita, la kongresoj ne plu rajtos alpreni decidojn. Nur deziresprimojn! La kongreso aplaudis denove. Kiu pli cedema, pli memforĝesema, ol nia Esperanta popolo? Ĝi forĝesis facile kaj volonte, ke se eĉ K. R. estus vera, decidpova, sendependa parlamento, la kongresoj konservus tamen rajtojn plebicitajn. En plena harmonio oni ekskursis poste tra „la lando de mil lagoj“. La kontrakta bulko estis definitive bakita.

En Vieno, Sinjoro U. E. A. aperis jam en pleneco de potenco. Ĉe ĉiu okazo, la „kontrakto“ defaladis de liaj lipoj tranĉante. — Kaj plie, oni ne enuigu lin per tiuj senĉesaj organizaĵaj demandoj! Ĉio jam solvita, jam organizita. — Restis la Konstanta Kongresa Komitato? — Malligi! I. C. K. kun U. E. A. okupiĝos pri la kongresoj... „interkonsente“. Cetere, kial kongresaj ĉiujare? Tio estas tiel monotona! — Oni devis peti. — Nu, bone. Li konsentas. Esperantistoj povos amuziĝi. Li eĉ aranĝos novajn ludetojn.

La kongreso estis obeema. Ĝi eksigis K. K. K. Ĝi deziresprimis modeste por fideleco al la Lingva Komitato. La deziresprimo iris en la korbon.

Kaj komenciĝis tiu malgaja kunvivo. Fortika Sinjoro U. E. A. kun dika cigaro en la buŝo. Pala, apenaŭ frapetanta K. R. Kaj I. C. K. — malriĉulo povanta vivi nur dank'al larĝanimaj monaj „subtenoj“ de U. E. A. *).

Moralajon el tio ĉi? — Kiam mi havas malgrandan provizon da greno kaj plurajn kampojn por semi, ne uzu tro multe por unu. Dividu saĝe kaj juste, aŭ vi perdos belan parton de l' rikolto. En nia Esperantista vivo, tiuj kampoj malzorgitaj de l' posedanto estas ne nur I. C. K. kaj K. R. Estas ankaŭ nia Akademio, kie mankas ne mi-
loj, sed simplaj svisaj frankoj por plej utilaj aferoj.

„Kion do fari por tion ripari?“ — kiel demandas melankolie malnova kanzono, tradukita de Grabowski. Kie serĉi eliron el la malbona situacio? Ĉu ne en unuigo? Nia celo estas unu. Unu nia movado. Ĉu restu pluraj organizoj?

Tion devas pripensi U. E. A.-anoj ne nur en Genevo, sed en la tuta mondo. Tion devas pripensi ĉiuj Esperantistoj.

Jan Kostecki.

*) Nunjare ankaŭ U. E. A. „donacas“ al I. C. K. 2.500 sv. fr. en sia 80-mila budĝeto.

MI MALAMAS...

Jan Kasprowicz.

Mi malamas la homojn, se ĉarmon
 Ili ne havas,
 Malamas tiujn, kiuj ne ravas
 Per amo,
 Ĉar ili en tomban malvarmon
 Ostojn kuŝigas
 For de la sun', kiu blindigas
 Per flamo...

Vane vi ilin en hor' matena
 Al ago vokus:
 Bruston ilian freŝa sufokus
 Aero!
 Pigmeoj, kies vivo senpena
 Aj ĝu' sopiras,
 Kiam aliaj al morto iras
 Pro vero!

Tradukis Br. Kuhl.

FORĜEJO.

Tintadas marteloj, fum' nigra aeron
 Penetras kaj tintas terure dentradoj:
 Poluson ni forĝas, sur nova la teron
 Pendigos — pro tio ĉi tiuj penadoj.

Tintadas marteloj, ŝvit' kovras vizaĝon,
 Ni forĝas konstante, ne konas la cedon,
 Ektremu la muroj! Forĝistoj, kuraĝon!
 En fajron, se mankas, ni ĵetu la kredon!

Fum' nigra volviĝas, ŝpruciĝas fajreroj,
 En fajro jam brulas la lastaj esperoj...
 Pliiĝu la fajron! Obstine! En flamon,
 Se mankas espero, ni ĵetu la amon!...

Br. Kuhl.

MIAJ REMEMOROJ.

(okaze de la „vespero de rememoroj“).

Bonegan ideon havis P. E. S. aranĝante le „vesperon de rememoroj“. Pli aĝaj esperantistoj rakontu siajn esperantistajn travivaĵojn al junaj gesamideanoj por vivi la dormemulojn kaj instigi ilin al laboro. Ĉu oni povus elpensi ion pli efikan, pli interesan kaj pli volontigan?... Despli ĝuste venis la feliĉa ideo, ĉar en Polujo lastjare komencis vekigadi el longedaŭra letargio la konscio kaj ambicio popola.

— En bona hor! ekpensis mi, trapasante la sojlon de P. E. S. Sinjoroj Belmont, Czubyński, Günther, Zamenhof Leono bele kaj instrue rakontis kiel, kiam kaj kial ili fariĝis Esperantistoj. Junaj gesamideanoj aŭskultis atente. Sed, kvankam ilia bonvolo estis forte vekata dum belaj „rememoroj“, aŭskultantoj ne povos multe fari por la vigligo de Esperanto-movado en Polujo, ĉar ili estis 12...

Estas granda domaĝo, ke la aranĝintoj de la „vespero“ ne invitis miss Polonia aŭ miss Judea. Estus bonega okazo fari propagandon poresperantan kaj jeti vortperlojn antaŭ la entuziasmiĝinta ĉeestantaro...

Pardonu al mi, estimataj junaj gesamideanoj venintaj en la ejon de P. E. S-ke mi rifuzis la peton diri kelkajn vortojn. Tamen, ĉar mi esperas, ke la P. E-ton legos eble multe pli ol 12 personoj, mi decidis publikigi miajn rememorojn. Por tiuj, kiuj bone scias la historion de Esperantomovado, mi eble diros nenion novan. Tamen — ĝi ne malutilos...

Kiam kaj kiel mi fariĝis Esperantisto?

Tuj post apero de la unua broŝuro en 1887 mi ricevis ĝin de mia frato kun peto atente tralegi ĝin. La atenta tralego havis preskaŭ tujan efikon. Post kelkaj tagoj mi redonis la broŝuron kun mia unua — nu, vi jam divenas — versaĵo. Frato donis al mi tuj la esperantistan bapton.

Kial mi fariĝis esperantisto?

En plej frua mia junulaĝo mi havis plenan konscion pri la granda graveco kaj utileco de unu komuna, interpopola komprenilo. Kiam aperis Volapük, mi kun miaj kolegoj atente studis ĝin kaj ekfervoriĝis por ĝi. Sed nur komence. Granda ĥaoso kaj multego da artefaritaj mortaj vortoj, baldaŭ senvolontigis min. Kiam post kelkaj jaroj mi legis la broŝuron de dr. Esperanto, mi subite kvazaŭ englutis iun kvanton da varma, freŝa viviga aero. Kiam mi la duan fojon legis la libron, mi estis homo, kiu jen sur vojo trovis oran moneron. Kelkajn paŝojn plu... li trovis duan... trian... kvinan... sepan...! Kia ĝojo!... tiom da oro!... Tia trezoro!... Li timeme ĉirkaŭrigardas — ĉu li ne songas?... ĉu iu ne volas forrabi de li la trovitaĵon?... Kaj jen, kiel dirite (kiel ĉiu pia kaj fervora esperantisto), mi komencis „krei“... Mi elskribis mian tutan inkujon, rompis kelkdekon da plumoj. Dekojn da versaĵoj mi skribadis kaj la dekunuajn mi montradis al nia frato. Li estis severa kritikanto.

Baldaŭ poste komenciĝis la puŝado de la afero — „Esperantomovado“...

Belege diris A. Grabowski:

— En kabano mankis pano, do — elmigris la infano... Elmigris ĝi — trans limon de la urbo, trans limon de la lando — en fremdujon, en la vastan mondon. La veturilo skuigadis, saltadis de ŝtono sur ŝtonon, de l' kavo en kavon, kiel senhelpa boateto sur maruraganaj ondoj. Ĉie renkontadis ĝin moko, malfido kaj malbonvolo. Estis tempo, kiam ekŝajnis al ni, ke la veturilo surveturis vojon glatan, sur la „neutralan lingvan fundamenton“. Ekŝajnis, ke sur tiu ĉi neutrala fundamento ĉiuj ŝtonoj, ĉiuj kavoj kaj truoj malaperis, kaj la vojo ebeniĝis. Ke homoj komencas komprenadi nian idealon, ke ili komencas „homiĝadi“.

Ĉu jam fino de skuado kaj saltado?... Ne. Trompa miraĝo. Oazo en granda dezerto. La „neutrala lingva fundamento“ komencas ŝanceliĝadi... Germano ne volas stari sur ĝi apud polo, polo — apud germano kaj ruso, kristano apud judo... k. t. p...

Peza, doloriga rememoron. Ĝi estis antaŭ 40 jaroj. Ni kunvenis arete en ies loĝejo. Kompreneble estis kelkaj malfruiĝintaj. Inter ili S-ro Nauman (ruso!), fervora kaj talenta esperantisto. Dume ni interparolis. Jen flanke mi ekaŭdis grandan veon:

— Nauman?!... li estas ja ruso!... ĉu ni laboros kun li?... Mi neniam forgesos tiun ĉi kunsidon...

Mala kompreno de la ideo. Ŝovinismo, belaj sed vanaj vortoj sonas kiel malplena sonorilo. Homa malsaĝo frostas la entuziasmon. Malgajiĝas la koro de nia ĉefo.

Veturilo, skuata de ĉiuj flankoj, apenaŭ tremiĝas meze de la homolupoj. Kelkaj el nia anaro perfide forlasas la vicojn kaj starigas propran tendaron (laŭesperantan). Nemultaj, kiuj restis, senlace paŝas la radon. Ili superforte laboras por vigligi la movadon kaj regajigi la koron de sia kara Majstro. Esperanto levas flugilojn. Vortoj ŝanĝiĝas per agoj. Venas kongresoj. Unua, dua, tria, kvara, kvina, sesa, sepa, oka, naŭa... Kaj subite halt'!... La dekan en Pariso dispelas kanonoj kaj tankoj. Furias la milito, detruante la esperplenan semajnon de „pacaj batalantoj“. Haltas por momento la veturilo. Haltas por ĉiam nobla koro de ĝia ĉefo, de Ludoviko Zamenhof... Multajn el niaj vicoj forrabis la morto, multajn — malkonsolo kaj malfido je nia ideo kaj nia destino... Kaj jen, kiam eksilentis la milito kaj homoj komencis denove esti homoj, la verda veturilo, kovrita per multaj honor-signoj, plena da gloro kaj famo eksterlanda, trapasas la limon de la lando kaj de la urbo, el kie ĝi antaŭ 42 jaroj forveturis senhelpa, malforta...

Do, esperantistoj tutpolaj de ĉiu koloro ĉu politika, ĉu religia unuiĝu kaj bonvenigu ĝin, la revenantan. Ne permesu, ke fremduloj estu ĉiam protektantoj kaj aprobantoj de tio, kio estas, kio devas esti nia propra fiero, nia propra gloro...

Floru Esperanto — ankaŭ en Polujo!

Felikso Zamenhof.



DEKLARACJA W SPRAWIE NEUTRALNOŚCI.

Od pewnego czasu wrogowie Esperanta utożsamiają ogólną propagandę międzynarodowego języka pomocniczego Esperanto z działalnością członków rozmaitych partyj, które w praktyce używają Esperanta dla pewnych społecznych celów.

Międzynarodowy Centralny Komitet Ruchu Esperanckiego w Genewie, wybrany przez 36 narodowych towarzystw dla propagandy Esperanta, a który przedstawia około 100.000 Esperantystów na całym świecie, oświadcza stanowczo, że jego program, dążący jedynie do wprowadzenia Esperanta, jest bezwzględnie neutralny w odniesieniu do spraw politycznych, religijnych, rasowych i społecznych.

Międzynarodowy Centralny Komitet stanowczo sprzeciwia się tym kłamliwym twierdzeniom, dążącym jedynie do szkodenia wielkiemu postępowi, który nastąpi skutkiem przyjęcia łatwego, neutralnego języka pomocniczego, obok odnośnego języka ojczystego.

**Międzynarodowy Centralny Komitet Ruchu Esperanckiego
z siedzibą w Genewie.**

POLLANDA KRONIKO.

Białystok. Ĉi-tiea Esp. Societo okazigos la 27-an de apr. grandan Esp. re-
vion: „Antaŭ la kongreso” kun dancoj post la prezentado.

Chełm Lubelski. Dank' al la fervora laboro de s-o prof. L. Kronenberg nun estas gvidataj ĉi-tie kelkaj kursoj de Esp. kun multe-nombra aŭdantaro. Kaj jen en la vira seminario instruista la kurson partoprenas 100 lernantoj, en la virina 130 lernantinoj, en la ŝtata komerca lernejo 90 personoj, en la humanista gimnazio 60 personoj. Tiun-ĉi eksterordinaran sukceson ebligis al s-o Kronenberg lernejspektoro s-o Krupczak kaj direktoro de la komerca lernejo s-o Furman. La komenciĝintan korespondan kurson partoprenas 20 geinstruistoj el la najbaraj lernejoj.

Kraków. La 25-an de marto Societo „Esperanto” okazigis eksterordinaran ĉefkunvenon, dum kiu oni decidis atendi kun la elekto de nova estraro ĝis la reveno de sia prezidanto, s-o prof. Bujwid. La 27-an de apr. prelegos per radio je la 17-a s-o Tad. Hodakowski je temo: „W kajdanach granic językowych (En la katenoj de la lingvaj limoj). Nepre alsendu dankesprimojn, petu pri Esp. kurso kaj eksterlandanoj pri regulaj prelegoj. Speciale eksterlandanoj povas multe helpi en niaj penadoj. Skribu tuj laŭ adreso: Polskie Radio, Basztowa, Kraków.

La 13 de apr. del. de UEA en Lwów, s-o Schnützer okazigis ĉe ni bone sukcesintan koncerton de l' orienta muziko (persa kaj araba). Venis multaj personoj el ekster samideanaro, kiuj ekinteresiĝis pri Esp., helpinta ricevi la bezonatajn muziknotojn.

Lwów. De tempo al tempo estas aranĝataj publikaj prelegoj. En aprilo finiĝis la dua granda kurso (ĉ. 50 pers.), gvidata de fr-ino Nadel kaj supera kurso de s-o Zausmer. Je fino de l' kurso okazis publika Zamenhofa akademio, kiu alportis belan sukceson. Nune komenciĝis nova kurso, gvidata de senlaca f-ino Nadel. Kunvenejo en Komerca Ĉambro, ĉiu-marde, jaŭde kaj sabate de 7^{1/2}—9 vesp.

Siedlce. Tie organizis kaj gvidas la kurson ĉe TUR kun 15 personoj s-o Bol. Żmuda.

Warszawa. Akademia Rondo de Esperantistoj ĉe Juda Akad. Hejmo kreis komisionon por informadi kaj helpadi pri partopreno en la Budapesta kongreso. La 14-an de aprilo je la 12 horo la Estraro metis la florkronojn sur la tompo de nia Majstro. Ĉiudimanche okazadas en la societejo esper. prelegoj je diversaj temoj.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

Australja. Przybył tam dr. Viltmits z Łotwy, odbywający podróż po świecie na motocyklu. Zwiedził dotychczas 50 krajów i wszędzie w nich znalazł esperantystów, z wyjątkiem 9-ciu takich, jak Mezopotamja, Centralna Afryka.

Austria. Tamtejsi robotnicy chrześcijańscy odnieśli piękny sukces. Pozyskali mianowicie dla sprawy Esper. naczelnego redaktora dziennika ludowego, który na łamach swojego pisma rozpoczął korespondencyjny kurs języka. Po ukończeniu tego kursu odbędzie się konkurs, w którym zwycięzca otrzyma jako nagrodę zwrot kosztów wyjazdu na XIV esper. kongres katolicki w Pradze, albo bezpłatny pobyt w czasie tego kongresu.

Bułgaria. Otwarto kursy językowe w miejscowościach: Burgas, Dolna-Banja, Rahowo, Samokov, M. Tirnovo, V. Staliska Mahala-Lomsko.

Czechosłowacja. Na mającym się tam odbyć w październiku br. zlocie robotniczych towarzystw sportowych językami obrad będą język francuski, niemiecki i Esper. Międzynarodowe Zjednoczenie Katolików Esperantystów urządza w Pradze swój XIV kongres w dniach od 11—15 sierpnia.

Francja. Kongres esperantystów francuskich odbędzie się w Nancy podczas Zielonych Świąt. Protektorat nad towarzystwem propagowania Esp. sprawuje 5-ciu ministrów, kilkunast senatorów i kilkudziesięciu deputowanych. Podręcznik do nauki Esp. prof. Carta doczekał się obecnie 14-go wydania i 106.000 egzemplarzy nakładu. Niech liczby przemówią!

Hiszpanja. Król Alfons XIII objął protektorat honorowy nad narodowym kongresem esper. w Sewilli, gdzie wystąpi w jego imieniu Don Carlos de Borbon.

Jugosławja. Dwutygodnik pracowników pocztowych w Jugosławji rozpoczął kurs korespondencyjny Esper., drukowany we feljetonie tego pisma. Oto skuteczna propaganda języka, godna naśladowania i w naszych organach związkowych. Gratulacje z powodu tego sukcesu prosimy wysłać pod adresem: Oblasna Organizacija P. T. T. Zagreb. Gratulacje zostaną opublikowane.

Sowiety. Moskiewska radjostacja urządziła 14 kwietnia o g. 21 koncert, poświęcony pamięci dra Zamenhofa. W Dniepropetrowsku odbywa się równocześnie 14 kursów ze 170 uczestnikami.

Szwajcaria. W dniach od 25 lipca do 4 sierpnia odbędzie się w Genewie 3-ci kongres Światowej Federacji Towarzystw Wychowawczych przy Współpracy Międzynarodowego Biura Wychowawczego. Dr Privat został zaproszony do wygłoszenia wykładu o Esper. Oceniając ważność tego kongresu dla naszej sprawy w kołach pedagogów ICK, na wniosek TAGE, postanowił wezwać wszystkich nauczycieli-esperantystów do wzięcia udziału w tym kongresie, rezygnując z uczestnictwa ich w kongresie budapeszteńskim, który, jak wiadomo, odbędzie się w dniach od 2—9 sierpnia.

Węgry. Artystyczny poranek towarzystwa literackiego w Budapeszcie, zainicjowany i urządzony przez esperancką gazetę Hungara Heroldo, odniósł piękny sukces, ściągawszy na salę około 700 osób. W produkcjach artystycznych brał udział, między innymi, znany poeta esper. J. Baghy.

Hungara Heroldo będzie w br. wydawany w dwóch nakładach — jeden tylko w języku Esp., drugi również i po węgiersku. Wszyscy, którzy się zapiszą na kongres, pierwszy z nich otrzymają bezpłatnie.

Włochy. W seminarjum duchownym w Bitonto i w arcybiskupim semin. w Bari rozpoczęto przymusowe kursy Esp. dla alumnów.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Plenumante dezirojn de multaj samideanoj ni okazigos

III. Pollandan Kongreson de Esperanto kaj

IV. Konferencon de P. E. D.

en la tagoj 29.—30. VI. kj. en Poznań, donante tiamaniere al ĉiuj ĉeestantoj okazon por viziti nunjaran grandiozan Ekspozicion. Prezoj kaj kategorioj de loĝejoj estas konataj el ĉiutaga gazetaro, kie aperadas komunikoj de la Ekspozicio. Por garanti al la partoprenantoj konvenan loĝejon estas necese jam nun mendi ĝin. La lastan daton de la mendoj ni sciigos poste.

La provizora programo estas: raportoj, Okazigo de Internacia Kongreso en Pollando, Balotoj de la estraroj de P. E. D., Vizitado de la Ekspozicio.

Kotizo kongresa (kun 1-foja vizitado de la Ekspozicio) estas zĵ 5.—

Provizora adreso por aliĝoj: J. Alfus, Kraków XXII, al. Dembowskiego 10.

Dum la tutlanda konferenco aranĝos P. E. D. 2 kategoriojn de ekzamenoj: 1) pri kapableco, 2) instruista. Ni komunikas la kondiĉojn, laŭ kiuj la kandidatoj povos fari la ekzamenon. Temo de la ekzameno pri kapableco: La gramatiko de Zamenhof (16 reguloj), legado en Esperanto, tradukado de facilaj tekstoj en Esperanton, interparolado. Temo de instruista ekzameno: Krom la kvalifiko supre dirita, teorio kaj historio de Esperanto, literaturo kaj didaktiko, korekta tradukado en esperanton. Kotizo por la 1/. — Zĵ 5, por la 2/. — Zĵ 10, pagotaj al samideano J. Alfus, Kraków XX, Aleja Dembowskiego 10. kun la rimarkigo: „por la ekzameno” aŭ dum la konferenco antaŭ ties komenco.

La aferon de pasportoj por Internacia Kongreso en Budapest prizorgas Ekzekutiva Komitato de P. E. D. Anoncu vin al s-o Ludwik Kutscher, Kraków, Grodzka 9. kaj por kovri la kostojn de la pasportoj enpagu al li zĵ 8.—

La grupoj estas petataj sciigi la ĝen. sekretarion pri instruado de Esperanto en lernejoj kiel sekvo de la ministeria cirkulero, informante detale pri la sukcesoj. Informojn bonvolu sendi antaŭ la kongreso por prepari statistikon.

Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

J. Alfus
ĝen. sekretario

Inĝ. E. Tor
prezidanto



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Lipowa 33, Białystok.
OFICIALA BULTENO No 6.

JARLIBRO 1929. Ni informas nian membraron, ke la nova Jarlibro de nia Asocio estas jam kompostata kaj baldaŭ aperos. Ĝi estos dissendata al ĉiuj novaj membroj kaj al ĉiuj malnovaj, kiuj repagis sian kotizon por 1929. La Jarlibro aperos nunjare unu monaton pli frue ol kutime, kion niaj membroj certe ĝoje aprobas.

ADRESSANĜOJ. Ofte okazas, ke membroj de nia Asocio, ŝanĝante sian loĝejon, forĝesas avizi al ni sian novan adreson. Pro tio la poŝto resendas al ni sendatajn al ili Nrojn de „Esperanto” ktp. Ni petas tial, ke pri ĉiu adressanĝo niaj membroj bonvolu kiel eble plej rapide informi la Ĉefdelegiton. Precipe nun, kiam ni jam preparas la banderolojn por la dissendo de la Jarlibro, necesas informi nin pri eventualaj adressanĝoj. Ankaŭ la membroj, kies adresoj eble estis ĝis nun malĝuste notitaj, bonvolu informi nin pri tio.

NEREPAGINTOJ. Ni tre petas niajn pasintjarajn membrojn, ke ili bonvolu kiel eble plej baldaŭ repagi siajn kotizojn al la loka Delegito aŭ al la Ĉefdelegito. Kiel ni jam anoncis, la aprila numero de „Esperanto” estos dissendita nur al tiuj Membro-Abonantoj, kiuj repagis sian kotizon por 1929. Al la nerepagintoj ni estos devigitaj konforme al la statuto ekspedi la aprilan numeron kun poŝta repago, aldonante kostojn de la poŝta enkasigo. Por evitiĝi al ni tiun laboron kaj kostojn al si, la membroj estas afable petataj tuj repagi siajn kotizojn.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Aprilo 1929 ni kalkulis 297 membrojn en Polujo, el kiuj 3 DM, 2 MS, 200 MA kaj 92 M. Atentinde estas, ke tiu ĝenerala nombro enhavas 99 novajn membrojn, kiuj bonvolis aliĝi al nia Asocio. Esperinde ni jam en proksima monato povos transpaŝi la pasintjaran nombron de nia membraro! Ni konstante varbu por pligrandigi nian membraron kaj plifortigi UEA en Polujo!

NOVAJ DELEGITOJ. Ĝoje ni anoncas la jenajn novajn Delegitojn kaj Vicdelegitojn:

LUBANIA n. Pilica.

D. Józef Bulski, instruisto.

LWOW.

VD. Józef Kucharz, fervojisto, ul. Na Błonie.

PELPLIN.

D. Antoni Troszyński, studento de teologio, Seminarjum Duchowne.

VD. Paulin Kalinowski, stud. de teologio, Seminarjum Duchowne.

STASZÓW.

D. Józef Żołnierz, gimnazia direktoro.

Białystok, la 1. 4. 1929.

J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.

TRADUKA KONKURSO.

La plej bonan tradukon havigis „Jon“, kies veran nomon ni ne konas. S-ano „Jon“ bonvolu malkovri sian adreson. Li rajtas senpagan librodonacon en valoro de 4 zł. Jen lia traduko:

M. Rodoć (Biernacki).

— Ha, skandal', skandal' sur tero!
 — Kio iĝis, nu, amiko?
 — Hundmalvarme, jen afero.
 Ho, fripona politiko!

Ĉar imagu: Ĵus en urbo
 Frost', sennuba la ĉielo,
 Dum amas' sur strata kurbo
 Kapojn streĉas al la stelo.

Kaj mi kune: streĉrigardas
 La tegmentojn, la kamenon,
 Duonhoron mi hazardas,
 Sed neniam vidas scenon.

Mi do flustras al najbaro:
 „Kio iĝis atentinda?“
 „Mi ne scias, mia karo“
 Kaj sin turnas respektinda.

Virin' staris ĉe vendtablo,
 Sed ŝi same informita.
 Do mi pensas: Al diablo!
 Mi foriru! — ekscitita.

Aŭ... ne tuj... amas' kuniĝis...
 Mi atendos nur momenton:
 Oni eble ne stultiĝis! —
 ...Klariĝ' indas eĉ patenton:

Ŝercvivista estis veto:
 Se vi starus antaŭ pordo
 Rigardante al nubeto,
 Samon faros cent' laŭ ordo.

Tri jam horojn — jen aŭskultu —
 Staris homoj sen la tedo
 Kapon supren (— ne insultu —).
 Malvarmiĝis al mi piedo

Malgraŭ forta kalkanfrapo.
 Prenu ilin diablaro!
 — Nu, vi kial staris, ĝapo?
 — Kaj pro kio staris aro?

Tradukis **JON**.

Aliaj konkursintoj — Sinjoroj: inĝ. Michał Chmieliński — Nowogródek, Miecz. Dembiński — Łódź, Jan Fiszer — Milejóv, Mjr. J. Kozłowski — Grudziądz, Karol Mikoś — Tarnobrzeg, Dr. Bron. Skałkowski — Ruda, Jan Thomanek — Wielkie Hajduki, Antoni Wachułka — Jarosław, L. Wajsbekier — Dąbrowa Gór.

La sekvanta Traduka Konkurso — pro manko de loko aperos en nia plej proksima numero.

Dr. L. Dreher.

UWAGA!

TANI MIESIĄC!

OKAZJA!

Od 1—31 maja br. nabyć można w Adm. Polskiego Esperantysty (Konto P.K.O. 406.660) po cenie zniżonej:

Rocznik „Esperantysty Polskiego“ za rok 1927.
(bez Nr. 1. wyczerpany) Zł. 4.50

Rocznik „Esperantysty Polskiego“ na rok 1928.
(pełne 12 n-ów) Zł. 5.50

wraz z przesyłką pocztową.

Ponadto poleca Admin. „Polsk. Esper.“ bogaty wybór dzieł esper. Katalog na żądanie bezpłatnie.

UWAGA! WAŻNE DLA KORESPONDUJĄCYCH Z ZAGRANICĄ!

A T E N T O !

Apartaj represoj de aperinta artikolo en decembra n-o de P. E. pri

„POLAJ KRISTNASKAJ KANTOJ“

kun esperanta traduko de du kantoj kun muziknotoj
estas aĉeteblaj ĉe:

Admin. de Pola Esperantisto po 0.35 gr. aŭ 0.20 sv. fr.

Por grupoj rabatita prezo minimume 10 ekz. 2.70 zł. aŭ 1.80 sv. fr.

MUZIKNOTOJ de Foxtrott -- Black-Bottom

„K — O — R — O“

Frapanta kaj bela melodio kun humorplenaj vortoj
de Raymond Schwartz kaj pola traduko.

Prezo: 3 zł. kun afranko.

Mendu ĉe Pola Esp. Asocio, Lublin poŝtkesto 74.

LIBREJA FAKO

D E

POLA ESPERANTISTO.

REKOMENDAS :	Zl.
T. Cart i J. Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.10
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
— El Parnaso de popoloj. Poemaro (bind.)	7.50
Gryfi — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Liem Tjong Hie — Javaj legendoj kaj fabloj	1.85
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Molière — L' avarulo	1.80
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem	
Tjong Hie, Semarang — Java	1.85
Prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj	1.50
Przybyszewski — La neĝo. Dramo	3.00
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein	
(Kabe)	1.20
J. Schmidt — La origino de la religio	1.00
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Gra-	
bowski	1.40
Słownik ścienny	0.25
Staff — Aŭtunaj agordoj, trad. Tuwim	1.00
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10
Insignoj esper. (steloj) po 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30, 4.50.	

La verkoj de Zamenhof :

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Iligenio en Taurido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baŝaraĥ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias. — Petu senpagan katalogon.

KRAKÓW, UL. SMOLEŃSKA 9.
KONTO P. K. O. 406.660.